



# TEA-BULTENO

20<sup>A</sup> JARO - N<sup>o</sup> 136

MARTO - APRILO

N. 3-4/2017

Neniu, eĉ se mastro de propra lingvo, rajtas superregi alian.  
*George Bernard Shaw, irlanda verkisto, dramisto, lingvisto, Nobel-premiito 1925 (1856-1950)*

## Jara Asembleo de TEA dimanĉon la 19<sup>an</sup> de februaro 2017

### Raporto de la prezidanto

Estimataj Asocioj, karaj geamikoj,

Ni denove troviĝas en tiu ĉi sidejo por la tradicia ĝenerala asembleo, en kiu ni memorigos la faritaĵojn, ekzamenos la situacion, eliros la konk-ludojn.

La pasinta jaro signis la 110<sup>an</sup> datrevenon de la fondiĝo de TEA. Bone kaj sukcese ni celebris la eventon per ekspozicio ĉe la Poŝta kaj Telegrafa Mezeŭropa Muzeo, kiu daŭris de la 16<sup>a</sup> de junio ĝis la 9<sup>a</sup> de septembro. Tiu ĉi estis nia ĉefa evento, kvankam okazis ankaŭ aliaj interesaj kaj sukcesaj programeroj. Pri ĉio ĉi, vi ricevos detalan raporton de Elda Doerfler kiu, kiel kutime, tre akurate informos vin.

Jam dum pasintaj ĝeneralaj asembleoj mi havis la okazon paroli pri la eblecoj kiuj de tempo al tempo prezentiĝas al nia Asocio por agadi kunlabore kun aliaj asocioj aŭ personoj. Bedaŭrinde malofte ni profitas el tio, sed kion fari?

Ni estas ĉiam pli malmultaj, ĉiam pli maljunaj, ĉiam pli kun problemoj. Niaj vicoj reduktiĝas pro tiuj ĉi kaj aliaj kialoj.

La vizito de niaj kunvenoj estas ege utilaj por la asocia vivo, por flegi kontaktojn, por interŝanĝo de ideoj kaj preparo de projektoj, kaj absolute necesaj por lingva ekzercado. Sed ankaŭ ĉi-rilate mi devas diri ke la situacio malboniĝas konstante. Dum niaj vendredaj kunvenoj malfacile ĉeestas pli ol 5-6 personoj, tiom ke ni decidis nuligi la mardajn renkontiĝojn, en la espero ke la vendredaj ricevu pli da atento. Se oportune, ni denove ŝanĝos horojn kaj tagojn.

En tiu ĉi ĝenerala malfavora bildo, estas tamen io esperiga: tri gejunuloj partoprenas la bazan kurson por lerni Esperanton kaj ili ne nur estas lertaj, sed havas grandan intereson je ĝi kaj en ĝiaj celoj. Kion diri? Ni esperu, ke ili restu inter ni kaj daŭre okupiĝu pri nia lingvo kaj laŭeble ĝia movado.

Ni troviĝas nun en la 111<sup>a</sup> jaro de TEA: kiom longe ĝi ankoraŭ povos agadi?

Tiu ĉi estas la plej grava demando al kiu por la momento mi ne povas respondi. Niaj financaj rimedoj reduktiĝas konstante kaj permesos al ni vivteni la sidejon dum ne tro longa tempo. Jam nun mi faras alvokon: TEA bezonos helpojn konkretan kaj ĉi-uspecan.

Mi finas tiun ĉi mallongan raporton per la ĉiama invito subteni nian Asocion per partopreno, kunlaborado en diversaj agadoj kaj ankaŭ per financa subteno. Se tio mankos, nenio malfavoros malaperon de tiu ĉi grupo - modeste parolante - unu el la plej renomaj, kreita antaŭ 110 jaroj.

Mi konfesas al vi ke malapero de TEA post tiom longa vivo, estus vera katastrofo kiun mi neniam volus travivi.

Vivu TEA kaj Esperanto!

*Edvige Tantin Ackermann*



### Agadraporto de la sekretario

Tre estimataj kaj karaj TEA-anoj! Alia jaro estas jam for kaj nia historia Asocio komencis sian 111<sup>-an</sup> vivojaron! Nun ni iom trarigardu kio estis okazinta dum la jaro.

**Januare:** Je la 8<sup>a</sup> ni partoprenis - en Galerio *Rossoni* - la prezentadon de la libro de

Edda Vidiz: *Magnar ben... per bon!!!*, dum je la 16<sup>a</sup> estis la vico de TEA prezenti samloke, antaŭ multnombra publiko kaj en ĉeesto de la triestaj poetoj, la poezian libron, "Kiam ekfloras la migdalarbo...". Ĝi estis tradukita de la triesta dialekto al Esperanto de teamo, konsistanta el E. Ackermann, A. Altherr kaj E.

Doerfler, kunlabore ankaŭ de aliaj anoj, kaj eldonita ĉe LUGLIO SPRINT, kiu disponigis salonon por ĝia prezento. La libro estas ankoraŭ aĉetebla en la librejo de la eldonisto. La eldonado eblis danke al la subteno de Regiono Friulo Juli-Venetio, laŭ leĝo pri la defendo kaj protekto de la minoritataj lingvoj.

**Junie:** Post aprobo de nia peto farita al d-ino Chiara Simon, prizorganto de la Poŝta kaj Telegrafa Mezeŭropa Muzeo de Triesto, estis realigita la projekto prezenti la temon: ESPERANTO KAJ FILATELO (L'ESPERANTO NELLA FILATELIA) en la muzeaj ejoj.

Temis pri grandioza laboro, kiu - sen la gvidado kaj helpo de la doktorino - estintus malfacile realigebla. La inaŭgura tago estis la 16<sup>a</sup> de junio; samtage aperis ankaŭ porokaza stampo. Menciindas, ke grave nin subtenis finance Itala Esperanto-Federacio. La ekspozicio daŭris ĝis la 9<sup>a</sup> de septembro: dum la periodo estis organizitaj gvidataj vizitoj (23<sup>an</sup> de junio kaj 1<sup>an</sup> de sept); la 30<sup>an</sup> de junio estis prezentita la poezia libro: KIAM EKFLORAS LA MIGDALARBO... kaj je la 7<sup>a</sup> de julio, la libro de Martin Stuppnig, de li skribita germane kaj de hungara esperantisto tradukita Esperanten: HOME SEN HOMEKO. Martin Stuppnig ĉeestis la eventon kune kun la urbestro de Arnoldstein, Erich Kessler. Porokaze venis ankaŭ esperantistoj el Bologna. Fine la 9<sup>an</sup> de septembro okazis publika projekciado de "L'Esperanto in cartolina. Storia ed evoluzione grafica delle cartoline esperantiste".

Por ĉiu aranĝo estis faritaj speciala poŝtkarto, koloraj invitiloj, broŝuroj, dum pluraj estis la afiŝoj propagandantaj la eventon. Aperis artikolo en la tagĵurnalo "IL PICCOLO", en la inaŭgura tago, kaj poste anoncoj pri la diversaj okazintaĵoj.

**Oktobre:** Ni ricevis de la FONDAĴO BIBLIOTEKO APOGO BACHRICH – UEA - la sumon de 123,22 € por Esperantaj libroj. Tiel la Estrarano de UEA pri Kulturo Sara Spanò klarigis la kialojn de la donaco: "La kvalito de la ricevitaj subvencipejoj estis mirinde kaj gratulinde alta, kaj atestas plenkonscian kaj engaĝitan sentemon pri la graveco pligrandigi la havaĵojn de niaj bibliotekoj, unu el la ĉefaj kolonoj de la valorigo de nia kulturo. Nia malfacila tasko estis identigi la plej elstarajn petojn, sed ni esperas alfronti similajn defiojn okaze de la venontaj alvokoj!"

Kaj nun pri la rutinaj **Enklubaj programoj:** dum la jaro multe da tempo estis dediĉita al preparlaboroj rilataj al la ekspozicio. Dum iuj vendredoj oni aŭ legis ion el E-libroj aŭ el la gazetoj, aŭ spektis perkomputile fotojn pri vizititaj kongresoj/renkontiĝoj. Oni daŭre esp-

loris la "Historio de la Esperanta Literaturo"-n, la imponan verkon de C. Minnaja kaj G. Silfer. Somere multnombraj ni ĉeestis laŭtradicie feston ĉe Anita.

**Esperantistaj gastoj en Triesto:** dum la jaro vizitis nin Elda kaj Alessandro Corrado el Brescia, Folkmar Keller el Vieno, Mian Salam Shany, rifuĝinta pakistano loĝanta nun en Udine, Peter Grbec el Koper, kiu venis al Triesto kun siaj gelernantoj por ekskursi, Alberto Muzzu kaj lia amikino el Gorizia.

#### **Pri kongresoj/konferencoj/renkontiĝoj**

Julie, UK en Nitro: partoprenis Barbara, Edvige, Elda, Gianni kaj Liliana; aŭguste, la 83<sup>an</sup> Italan Kongreson en Frascati ĉeestis Elda kaj Margherita. Dum ĝi estis prezentitaj la du eldonitaĵoj de TEA: TRIESTO, INTER KARSTO KAJ MARO kaj la poezia libro. Septembre, ni ĉeestis la Feston de Amikeco sur la Trilanda Pinto.

#### **Pri ekstera informado:**

Kiel kutime, **anoncoj/informoj** pri kursoj, programoj, aranĝoj en Triesto kaj aliloke estis senditaj dum la jaro al lokaj radioj, ĵurnaloj kaj precipe rete. Je la 1<sup>a</sup> de oktobro, artikolito pri la komenco de nia agado aperis en "La Voce del Popolo" (La Voĉo de la Popolo), la ital-lingva tagĵurnalo de Istrio kaj Kvarnero.

**Alirprogramoj:** preskaŭ ĉiumonate oni povas aŭskulti pri Esperanto en la dissendoj de RADIO UNO. Dum la jaro entute estis 6 elsendoj pri diversaj temoj.

#### **Ĝeneralaj informoj:**

**TEA-Bulteno:** senhalte la ses-paĝa asocia informilo aperas ĉiun duan monaton. Ĝi estas dissendata al ĉiuj membroj de TEA, ĉu paperversie ĉu rete, kaj ankaŭ al pluraj esperantistoj/grupoj tra la mondo.

**Kat-Amikaro:** La NOVAĴ-LETERO, nun jam de pli ol unu jaro redaktata de Elda Doerfler, aperas regule 3-foje en la jaro. Ĝi estas transdonita nur rete.

**Estrarkunsidoj:** dum la jaro oni kunsidis 4 fojojn plus unu eksterordinara kunveno en majo.

**Korespondado:** en papera versio estis ricevitaj/senditaj deko da leteroj; retaj mesaĝoj senditaj/ricevitaj estis pli ol ducent: tiuj troviĝas en kompakta disko en la koncerna ujo pri „Korespondado 2016“. [Eldā Doerfler](#)



Estis decidite, ke oni ne plu kunvenos dum mardoj. Ekde marto, la sidejo estos malfermita ĉiu-ĵaŭde kaj ĉiu-vendrede.

Sed ni estas/os ĉiam feliĉaj, akcepti ĉiun ajn dezirantan nin viziti; renkontiĝi kun amikoj por agrabla interbabilado; bonvenigi vojaĝemajn esperantistojn kiujn volonte ni akompanos tra Triesto, ktp. Do, asocianoj, amikoj, vizitantoj el aliaj urboj/landoj, vi ĉiam estos bonvenaj! En la kolofono oni trovas la kontaktojn: telefonajn aŭ retroŝtajn!

Ĝis iam ajn! ... sed kiel eble plej baldaŭ!

**KION PRI**  
***HISTORIO DE LA ESPERANTA LITERATURO?***  
**Libro de la jaro 2015**

La legantoj de nia Bulteno certe rimarkis, ke praktike unu-foje monate, vendrede, ni okupiĝas pri la fama *Historio de la esperanta literaturo*, verkita de Carlo Minnaja kaj Valerio Ari (Giorgio Silfer), aperinta en 2015 kaj oficiale prezentita en Lille okaze de la 100<sup>a</sup> Universala Kongreso, kvankam ekster ĝia kadro.

Tiu prezento estis tre sukcesa kaj la publiko vore aĉetis la libron, tiom ke la kopioj, disponigitaj de la aŭtoroj por la okazo, rapidege elĉerpiĝis. Multaj esperantistoj deziris ĝin aĉeti ĉe la kongresa Libroservo, sed ne eblis pro minimuma kvanto surbretigita fare de UEA, kiu forvendiĝis fulmrapide. Maloportuna politiko tiu de UEA, cetere kontraŭ ĝiaj propraj intereso. Sed kion fari? Tiel la mondo iras ... kantas belege Julian.

Bonŝance nia libroservo (de TEA) aĉetis plurajn kopiojn jam antaŭe, tiel ke ni ne devis suferi pro manko ĉu en la asocia biblioteko, ĉu en la niaj hejmaj.

La libro estas nek romano, nek poemaro, sed vera enciklopedio, kiel atestas la 748 paĝoj densaj je historio, nomoj, informoj, bildoj, klarigoj pri multaj temoj kaj, malgraŭ ĉio, facile legebla.

La TEA-membroj, kiel plejparte el la esperantistaro, ne estas fakuloj pri literaturo ĝenerale kaj des malpli pri tiu esperanta, ankaŭ ĉar ĝis la apero de tiu ĉi libro mankis verko tiel vasta kaj kompleta pri la stato de nia literaturo originala. La libro do, plenigis grandan vakuon en la Esperanta eldona agado, permesante tiamaniere profundigi pli vastan pristudadon.

Do, triestaj esperantistoj estis duoble bonŝancaj: ili posedis la libron kaj havis la eblecon posedi (almenaŭ klopodi pri tio ĉi) la oportunajn kaj necesajn konojn pri la literaturo de nia internacia lingvo Esperanto.

Mastrumi lingvon ne signifas vere koni ĝin, oni devas ankaŭ mastrumi ĝian literaturon, ĝian historion, bone koni kaj apogi ĝiajn verkistojn kaj rolulojn en diversaj kampoj.

Ni komencis tiun ĉi grandan instruan laboron pasintjare: ekde la unua ĉapitro, kiu pritraktas la periodon 1887-1921, ni estis imponitaj. Kiom malmulte ni sciis! Kiom riĉa estis la informfluo!

Ĉiuj atente kaj kun granda intereso partoprenis en la vesperaj kunvenoj kaj ne nur aŭskultis kaj legis, ankaŭ diskutis, demandoj estis starigitaj, kaj ĉio ĉi favoris la scivolemon pri aliaj libroj kaj aŭtoroj. En nia biblioteko, titolita je la nomo de grava loka esperantisto Francesco Chierego, troviĝas pli ol 1600 libroj, abunda

hemeroteko kaj plurspecaj bultenoj: facilas elekti ion ajn pro enkomputiligo de la katalogo.

Malnovaj kaj novaj verkoj, aŭtoroj, temoj, gramatikoj kaj vortaroj plurlingvaj intermiksiĝas, donante al esploranto emociojn kaj ofte kontentigojn. Bela kaj interesa panoramo de nia Esperanto-kulturo!

La verko de Minnaja-Silfer estas tre ampleksa; ni ne rapidas kaj ŝatas gustumi kaj digesti iom post iom la enciklopedian scion proponitan de tiu paro, pri kiu ni multe fieras: temas pri altnivelaj kleraj italaj esperantistoj kaj literaturistoj.

Finfine mi ricevis la malfruajn numerojn de *ESPERANTO*, revuo eldonita de UEA.

Tri el ili alvenis samtempe... Mi trafolumis scivoleme. En la novembra numero trafis min la titolo «Intervjuo kun Jorge Camacho» kaj la unuaj vortoj. Strange ... oni intervjuas personon pro la fakto de tiu fariĝis 50-jaraĝa... Hooo, kiom da similaj artikoloj ni ĝuos en la proksimaj tempoj? Ja multaj personoj atingas tiun aĝon. Ĉu stilo nova de la redaktoro? Verdire oni ne scias, kiu estis la intervjuanto, estas skribite iom nebule «ni petis intervjuon», tamen ne gravas, mi plulegas.

Pli-malpli meze de la artikolo, troviĝas forta atako, insulta kaj ŝoka, pri pluraj personoj tre aktivaj en movado kaj en diversaj roloj kaj fakoj.

Neniam mi legis en la oficiala revuo de UEA similajn venenajn vortojn. Kaj mi ege miras ke la redaktoro permesis la publikigon. En tiu artikolo oni insultas iujn kiuj dum multaj jaroj havis la ĉefajn gvidajn rolojn en UEA mem, oni insultas la Komisionon kiu aljuĝis premion al la libro pri kiu mi parolas ĉi tie, oni insultas membrojn de la Akademioj *de Esperanto* kaj *de Literaturo de Esperanto* kaj de kelkaj aliaj gravaj movadaj instancoj, oni insultas dumvivantan membron de UEA, apartenanta al renoma esperantista familio kiu donis monon kaj nomon al la ĉambro de la ĝenerala direktoro.

Kaj kion diri pri la vortoj adresitaj al la libro mem kaj al artikolo aperinta pasintjare en la sama revuo de UEA? Ĉu la redaktoro komprenis la signifon de tiuj vortoj kaj tion, ke li respondecas pri ili?

Mi demandas min, kiamaniere tio povis okazi, ĉu simpla neglekto, ĉu kundivido de tiuj vortoj kaj opinio? La solaj frazoj kaj opinio kiujn mi povas kundividi estas ĝuste la lasta en tiu paragrafo: «Tio diras multon pri la malseriozeco de la movado».

Tiu artikolo plene pravigas la maldungon de la redaktoro.

*Edvige Ackermann*

## Adiaŭaj salutoj al amikino!

Kiom longe mi nenion aŭdis pri vi, amikino mia! Jes, estas iom strange, ĉar - se ne ĉiutage - almenaŭ ĉiun duan aŭ trian tagon io de vi eniris mian mesaĝujon. Ja, ni estus devintaj kuniri al UK, en Nitro, vi estis aliĝinta kaj paginta kompreneble. Sed silento, ankoraŭ silento! Kial ĉio ĉi ne alarmis min? Tro da farendajoj, mi devas tion kaj ĉi tion pretigi, aĉeti por la vojaĝo, serĉi filatelaĵojn por interŝanĝado kaj... kie diable mi kaŝis tiun pakajeton kun la glumarkoj? Absolute mi ne devas forgesi la diskojn por prezentado de ELF-AREK dum UK! Ĉio, ĉio malordas, mi ne estos preta ĝustatempe! Tamen daŭre estis iu vermeto kiu boris mian menson, sed mi iel klopodis ĝin silentigi, por ke ĝi ne aŭdacu skui min de mia malatentemo al amikino. Je certa punkto, ne plu mesaĝojn perkomputilajn mi sendis, eble via poŝta kesto tro plenas, ĉu la servanto blokis la eniron/eliron de korespondaĵoj? Eble plifacilas vin atingi per poŝtelefono: «kie vi estas, Fani? Ĉu vi jam survojas al Nitro? Bonvolu respondi, dankon!»

Nenio, kaj nenio, kaj daŭre nenio.

Rapide, senhalte pasas kaj pasadas la tempo! De tempo al tempo mi komencas ricevi mesaĝojn de esperantistoj demandantaj min, ĉu mi havas novaĵojn pri vi. Ne, bedaŭrinde ne! Mi ne scias, kien Fani mal-

aperis! Nu, venontsemajne mi veturos al vi, al Izola, kaj persone konstato pri via sanstato kaj ekkonos la kialojn de via silentado, tro brua nun... la silentado. Venontsemajne... kaj venontsemajne; ankoraŭ ne eblas, tro da aferoj: jes, jes, postvenontsemajne, certe! Se ne, ja, nepre venontmonate! Forflugas, forflugadas la tempo! Tagoj + semajnoj = monatoj, ... unu ... du ... tri ... kvar ...

Kaj nun?!? Nun mi hontas, ho, kiom mi hontas! Mi ne kondukis kiel vera amikino, mi permesis al eksterordinaraĵoj sed eĉ al ĉiutagaĵoj transformi min al sensentemulo, al glacia indiferentemulo.

Kiam pasintsemajne, kun amiko, ni decidis - finfine!!! - esplori pri via malapero, jes ja, tro malfrue! Neniu en via hejmo, neniu en la tuta domo estis! Malmulte da homoj surstrate, ne estas somera tempo kaj preskaŭ neniu nun libertempas en Izola. Apud via domo, fiŝvendejo - kiom vi ŝatis fiŝojn! - eble la vendisto scias ion. "Ho, Fani mortis jam de unu, eble du jaroj!" - "Tempo galope forkuras, sed ne tiom rapide!" - en mia memo mi pensis. Hazarde preterpasas samdomanino, al kiu sin

turnas la fiŝvendisto, kaj jen la konfirma respondo: "Fani mortis pasintjare, en novembro, kaj ŝia lasta ripozejo estas la familia tombo en Ljubljano." Kelksekunde la maldolĉa informo trairas la menson kaj doloriga sago trapikas la koron. Ĉio finita, ne plu eblas ripari la domaĝon, ne plu eblas retrokuri al pasinteco por ĝin ŝanĝi! Senrimede perdita la eblo, ankoraŭfoje diri al Vi, kiom profunda kaj sincera estas mia admiro al vi, al Vi kiel amikino, esperantistino, virino. Per nekredablaj kuraĝo, persistemo kaj firmeco vi alfrontis ĉiajn batojn de la sorto (kaj da tiuj multaj stumbligis vin laŭlonge de via vivovojo!), ĉiam kun rideto surlipa. Ĝislaste vi volis vin doni al nia Afero, per organizo de la 17<sup>a</sup> AA-Konferenco en Izola: tute sola!

Nu, adiaŭ, kara Fani, vin neniam mi forgesos: vi daŭre vivos poreterne en mia koro!

Ripozu en paco!

*Elda*

Saluton, Fani! post longa penado, vi ripozas pace. Ja, vi certe preferus plu restadi ĝoje ridetante kun ni, kaj en aprilo partopreni la 19<sup>an</sup>



Alp-Adrian Konferencon en Brežice. Jes, Fani, en Brežice!!! Anton Miheliĉ organizos. Ĉu vi memoras en Izola dum la 17<sup>a</sup> AA-Konferenco 2013, kiom multe vi instigis kaj kuraĝigis lin tion fari la postan jaron? Kaj same en 2015 en Opatija, 18<sup>a</sup> Konferenco, vi puŝis lin kaj Slovenian E-Ligon...

Nun, 2017, Anton estas preta kaj vigele startis organizado de la evento. Sed ... kia bedaŭro, vi ne estas preta. Jam tro malfrue. Tamen mi certas ke spirite vi estos inter ni, ĝuos la etoson kaj pensos, kiom prave vi sugestis konfidon al tiu ne delonga tempo esperantisto el urbeto slovena proksima al la kroata landlimo.

Kaj ĉu vi memoras nian vojaĝon al Sicilio por la itala kongreso? Mi ĝojas ke vi sukcesis tiun eventon partopreni en mirinda suditala lokiĝo, pri kiu vi dum multaj jaroj revis. Ankaŭ ĉi-jare la itala kongreso okazos sude: tiam ĉe tiu maro, ĉe tiuj artaĵoj, miaj pensoj al vi direktiĝos. Kaj ĉu vi memoras nian marŝadon 12-kilometran, de la Kastelo de Miramare ĝis la centro de Triesto, en iu belega maja tago, okaze de speciala sporta evento nomita "Bavisela"? Tiam vi timis ne sukcesi finmarŝadi, la distanco estis granda precipe por vi, sed malgraŭ ĉio vi atingis la alvenpunkton kaj tute ne estis la lasta alveninto. Belegaj rememoroj, neforgeseblaj travivaĵoj!

Ridetu ĉiam, karulino, ankaŭ tien, super la nuboj, alten en la ĉielo.

*Edvige*



**19-a ESPERANTO -  
KONFERENCO  
de ALP-ADRIO  
Brežice – Slovenio,  
22-23 aprilo 2017**



21-a Vend	19a/20a h	Akcepto kaj pago de partoprenantoj en la konferenceja salono
22-a Sab.	8h30	Akcepto kaj pago de partoprenantoj
	10h00	Oficiala malfermo, kun salutoj de aŭtoritatoj, urbestro de Municipo Brežice kaj grupaj reprezentantoj
	10h30	130 Jaroj de Esperanto-movado <i>Janez Zadavec</i> Antaŭ 100 jaroj forpasis Ludoviko Lazaro Zamenhof <i>Elda Doerfler kaj Edvige Ackermann</i> Alp-Adriaj regionoj kaj Esperanto <i>Edvige Ackermann</i>
	12h30	Komuna tagmanĝo ĉe la konferenceja salono
	13h30	Diskuto pri la temo "EUROREGIO SEN LIMOJ". "Kiu scias datojn kaj faktojn pri Ludoviko Lazaro Zamenhof?" Kvizo-ludo inter du aŭ tri teamoj
	15h00	Promenado tra la malnova urba centro
	16h30	Ĝenerala asembleo de la Alp-Adria Komitato - diskutoj, proponoj, ks
	17h30	Komuna vespermanĝo (Gastejo <i>Santa Lucia</i> en la urba centro)
	19h00 22h00	Kultur-amuza programo: Miksita kantkoruso, recitaĵoj, dancmuziko (Gastejo <i>Santa Lucia</i> en la urba centro)
23-a Dim.	10h00	Turisma programo (per buso): vizito al <i>Pleteršnikova domaĉija</i> (Hejmo de Pleteršnik) en la vilaĝo Pišce; vizito al <i>Repnice Najger</i> (Rapujo de Najger), Bizeljsko
	15h00	Adiaŭ kaj ĝis la revido!

**GRAVAJ INFORMOJ!**

La Konferenca aliĝkotizo egalas al 10,00 €, pagotaj surloke. Eblas aliĝi ĝis la 1<sup>a</sup> de aprilo. La Konferencejo estos la JUNULARA CENTRO BREŽICE, situanta en Gubčeva ul. 10a, Brežice. Por sciigoj pri la tranokteblecoj kaj aliaj kostoj, bv. vizitu la tt-ejon de la organizanto Anton Mihelič: [www.anton.mihelic.com](http://www.anton.mihelic.com) aŭ sendi al li mesaĝon: [antonmhl@gmail.com](mailto:antonmhl@gmail.com).  
**Bonvenon al la 19<sup>a</sup> Alp-Adria Konferenco!**

**BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO**  
Redaktanto: Elda DOERFLER - [testudo.ts@gmail.com](mailto:testudo.ts@gmail.com)  
Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste  
Kunventagoj: jaŭde 17-19; vendrede 19-21  
Tel: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936  
Banka Konto: Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439  
Reto: [esperantotrieste@yahoo.it](mailto:esperantotrieste@yahoo.it); [nored@tiscali.it](mailto:nored@tiscali.it)  
Asociaj tt-ejoj: [www.tea1906.altervista.org](http://www.tea1906.altervista.org); [www.karstajtagoj.altervista.org](http://www.karstajtagoj.altervista.org)

**Marta Programo**

2-a, jaŭdo	17h00 - Kurso de esperanto
3-a, vendredo	20h00 - 8-a de marto TAGO DE VIRINOJ - Esperanto-Virinoj en nia Literaturo
8-a, merkredo	14h50 - Esperanto en alirprogramoj RAI UNO
9-a, jaŭdo	Ne okazos kurso!
10-a, vendredo	Sidejo fermita
16-a, jaŭdo	17h00 - Kurso de esperanto
17-a, vendredo	20h00 - Arturo Ghez: nia pioniro. Legado de artikolo (1912) kaj de la teatraĵeto: LIA VENTUMILO
23-a, jaŭdo	17h00 - Kurso de esperanto
24-a, vendredo	20h00 - Bildoj por lerni
30-a, jaŭdo	17h00 - Kurso de esperanto
31-a, vendredo	20h00 - Fotolibro pri Marĉelo

**Aprila Programo**

6-a, jaŭdo	Ne okazos kurso!
7-a, vendredo	Sidejo fermita
13-a, jaŭdo	Ne okazos kurso!
14-a, vendredo	20h00 - Legado de la "Historio de la Esperanta Literaturo"
20-a, jaŭdo	17h00 - Kurso de esperanto
21-a, vendredo 22-a, sabato 23-a, dimanĉo	Partopreno en la 19 <sup>a</sup> E-Konferenco de Alp-Adria Brežice, Slovenio
27-a, jaŭdo	17h00 - Kurso de esperanto
28-a, vendredo	20h00 - Bildoj por lerni

**Cerbotiklilo 71**

Solvo de la kvizo de Viglo, aperinta en la antaŭa TB. La du demand-signojn oni devas devas anstataŭigi per la nombroj:

**41 kaj 34.**

Fakte ĉiu nigra nombro rezultas el la sumo de la supra kaj dekstra nombroj, dum ĉiu ruĝa nombro rezultas el la sumo de tiuj supra kaj maldekstra. Tial:

**20 + 21 = 41**

**17 + 17 = 34.**

Post lotumado, gajnis libro-premion **Egle Mongiello, el Triesto**. Gratulon al ŝi!



VIGLO

# *Uno per tutti ... cinque per mille!*

## **AIUTACI AD AIUTARE L'ESPERANTO**

*Il 5 per mille dell'IRPEF all'Associazione Esperantista Triestina  
senza costi per voi!*

Anche quest'anno i contribuenti, grazie alle disposizioni inserite nella Legge Finanziaria 2006, possono destinare il **5 per mille dell'imposta stessa** a sostegno di determinate iniziative di rilevanza sociale.

**La nostra Associazione è fra gli enti che  
possono ricevere questo contributo.**

Come fare ?

È molto semplice: basta indicare il numero di codice fiscale dell'Associazione nell'apposita casella prevista per la destinazione di questo contributo, nel momento in cui effettuerete la dichiarazione dei redditi per il 2016 (con il mod. Unico, il 730, il CUD, ecc). Il codice fiscale da indicare è il seguente:

**90012340320**

Invita perciò i tuoi amici, parenti, conoscenti, colleghi di lavoro, e tutte le persone che in qualche modo si dichiarano favorevoli all'esperanto, a scrivere nell'apposito spazio previsto nella dichiarazione dei redditi il

**numero di codice fiscale  
dell'Associazione Esperantista Triestina**

Ringraziando per l'appoggio che ci potrai dare, porgiamo cordiali saluti.

ASSOCIAZIONE ESPERANTISTA TRIESTINA

Il Presidente

*(Edvige Ackermann)*

---

Associazione  
Esperantista Triestina  
90012340320

Associazione  
Esperantista Triestina  
90012340320

Associazione  
Esperantista Triestina  
90012340320

Associazione  
Esperantista Triestina  
90012340320

Associazione  
Esperantista Triestina  
90012340320

Associazione  
Esperantista Triestina  
90012340320

Associazione  
Esperantista Triestina  
90012340320

Associazione  
Esperantista Triestina  
90012340320

Associazione  
Esperantista Triestina  
90012340320

Associazione  
Esperantista Triestina  
90012340320